

El la plumo de akademiano Douglas B. Gregor

1958: La fontoj de Esperanto. SCIENCA REVUO, 92-110. *Purmerend.*

Du notoj pri la Universala Vortaro. SR, 111-115. *Purmerend.*

1959: Ankoraŭ pri la Esperanta Radikaro. SR, 91-92. *Purmerend.*

La Esperanta traduko de la Malnova Testamento. Dek-biblia konkordanco de 518 diskutindaj versoj. XII + 57 p. Propra eldono de la aŭtoro.

1960: Sofoklo: Reĝo Edipo kaj Antigona. (Enkonduko, elgrekigo kaj notoj de D.B.G.) - Bel-literatura eldon-serio, 16. Eld. *J. Régulo, La Laguna.*

1969: *Atlantis* pluaj teorioj. SR, 133-134. *Beograd.*

1970: La Zamenhofa uzado de kvazaŭ. SR, 145-148. *Beograd.*

1974: La plej fruaj senafiksaj kunmetaĵoj en Esperanto. SR, 81-102. *Beograd.*

1976: La plej fruaj senafiksaj kunmetaĵoj en Esperanto (korekta aldono). SR, 153-156. *Beograd.*

1978: La plej fruaj senafiksaj kunmetaĵoj en Esperanto (2-a aldono). SR, 129-133. Ĉapeko.

J. Kavka

Pri laŭeble internacia fonetiko de la nacilingvaj grafismoj por la propraj nomoj en Esperanto-tekstoj

*Manuel Gomes (Portugaliao)**

1. Enkonduko.

Ne temas pri tio, ĉu en esperanta teksto oni uzu aŭ ne uzu, pli aŭ malpli abunde, aŭ ĝis kia kvanto, la nomojn en la originalaj nacilingvaj formoj. Tio koncernas specife la uzantojn mem laŭ ilia individua konscio, laŭ la verkoj (kiel fidindeco de la fontoj, seriozeco de la temoj, eĉ pro adekvataj ebloj, privolata celo k.a.).

Temas jes, pri la konstato de la faktoj. Krome, la nacilingvaj formoj estas devige la konstantaj bazoj por ĉio internacia.

El ĉio la celo estas, trovi globece mezan fonetikan interpreton de la nacilingvaj grafismaj sistemoj tiamaniere, ke anstataŭ ĥaoso vide al tiuj sistemoj oni prefere konsciu pri iu taŭga fonetika esprimo. Kvankam kalejdoskope varia, sub principoj de prononca tolereblo, la esprimo estu eble neniam malpli fidinda ol tiu, kiu estas akirita laŭ asimila procedo.

Precize, tiu ĉi artikolo per si mem ne emas pli ol eltrovi, kiuj implicaj bazaj reguloj ekzistas, kaj per ilia konstato lasi kampon por instigo al kreo de simplaj principoj, akceptendaj por universala fonetika interpretado.

2. Simplaj vokaloj.

La kvin vokaloj "a, e, i, o, u" povas havi, en pluraj nacilingvaj fonetikaj sistemoj, diversajn son-nuancojn. El tiuj oni registras ĉi-sube la plej diferencigeblajn:

* *Silveira-Pico, Açores.*

Oni frandu, dum oni povas!

el esperanto 10 '82

Ses monatoj
post la apero
jam duonstoke
la libro
forvendiĝis.

La plej
furora libro
de 1982!

Aldo de' Giorgi verkis "subjektivajn poemojn", kiuj temas pri liaj sentoj de amo, maliluziigo kaj soleco. La enkondukon en la versaĵojn de Aldo verkis Marjorie Boulton, kaj Reto Rossetti inventis specialan Rimportreton al la aŭtoro. Akompanas la unuopajn poemojn belegaj fantaziaj desegnaĵoj, kiujn Jean E. Bomford verkis samspeciale nur por tiu libro.

Edistudio, 1982. 64 p, 30 cm, ilustrita, bindita, ISBN 8870360156 18,00 gld. - 33% rabato por mendoj de almenaŭ 3 ekzempleroj

Mendu ĉe via libroservo aŭ rekte ĉe

Edistudio, tf. +39/50/48670, c.p. 213, I-56100 PISA, pĉk 12230561

Tab. 1

klasoj	la (baze, pure) buŝaj		la (krome) nazalaj			
	(speciecaj)		(hibridaj)	(ne tiom ofte)		
	apert.	ferm.				
"vastaj"	a e ə	a e o	æ œ (ø, ø)	ẽ ë	ã ë õ	o
"malvastaj"	i u	y (ü)		ĩ ũ		ỹ

Ankaŭ okazas, ke iuj vokaloj pro pozicio aŭ pro nacilingva prononca nelekto estas preskaŭ aŭ tute mutaj: *a, o, (e)*.

Tamen tia vario de la vokalsonoj ne ĝenas la legadon, ĉar oni kutime ilin prononcas simple, laŭ la esperanta fonetika sistemo. Tia procedo same estas la plej sekvata en la asimiliĝo.

Ne ĉiam ofte facilas tia fonetika interpreto, ĉar okazas, ke ĉe iuj formoj tiuj vokaloj povas okupi sonojn anstataŭe aliajn ol la siajn kaj oni demandas: ĉu oni devas konsideri ties esceptan regulon, almenaŭ por la plej elstaraj okazoj eble en la kadro de aparta nacilingva fonetika sistemo por eviti konfuzigan kolizion kun la ĝeneralaj sistemoj?

Citende, ekzemple kaj precipe, ke la anglaj (*En*) *a, i* iapozicie sonas respektive "ej, aj".

Notinde, ke inverse, ĉe iuj lingvoj de la orienta Eŭropo aperas iuj nomoj, al kiuj mankas ortografiaj vokaloj por esti legataj laŭ esperanta modelo. Tiajn oni povas legi, metante fonetikan "e" antaŭ "r" kaj "l" aŭ post *sz, cz*, laŭ vidotaj ekzemploj.

3. Vokalgrupoj.

3.1. Eblaj kombinoj.

En la naciaj lingvoj tre ofte aperas diversaj vokalgrupoj, ĉu por indiki koncernajn sonkombinojn, ĉu por indiki simplajn aliajn rezultsonojn.

Jena kadro prezentas la eblajn grupiĝojn de vokaloj, kie oni ilin dismetas ekde la pli "vasta" (*a, o, e*) ĝis la pli "malvasta" (*u, i*):

<i>aa</i>	<i>ao</i>	<i>ae</i>	<i>au</i>	<i>ai</i>
<i>oa</i>	<i>oo</i>	<i>oe</i>	<i>ou</i>	<i>oi</i>
<i>ea</i>	<i>eo</i>	<i>ee</i>	<i>eu</i>	<i>ei</i>
<i>ua</i>	<i>uo</i>	<i>ue</i>	<i>uu</i>	<i>ui</i>
<i>ia</i>	<i>io</i>	<i>ie</i>	<i>iu</i>	<i>ii</i>

En tiu ĉi kadro oni distingas, por praktikaj celoj, jenajn grupojn:

— Kombinoj de "vasta" kun "malvasta" (*ai, ei, oi; au, eu, ou; ui, iu*) kaj inverse (*ia, io, ie; ua, uo, ue*);

— Kombinoj de du (pli malpli) "vastaj" vokaloj (*ao, oa; ae, ea; oe, eo*);

— Kombinoj de du ripetataj vokaloj (*aa; ee; ii; oo; uu*);.

3.2. (Ĝeneralaj) teoriaj nocioj por prononcado de la vokalkombinoj.

La vokalgrupoj ĝenerale prezentas ĝenojn al la internacia leganto. Oni tamen povas preskaŭ forigi tiajn ĝenojn, se oni sentime akceptas ties prononcon sen speciala priokupo pri la preciza sono nacilingva.

Por tio oni devas enmense teni jenajn nociojn, kiuj fariĝas "principoj", el kiuj oni elektas la pli korektan manieron.

3.2.1. Pri la grandiga interrilata efiko de "vasteco-malvasteco", per kiu oni donas ĝeneralan prononcan preferon al la vokaloj plej "vastaj" (ekz. la jena ordo: *a, o, e — o, u — e, i*);

3.2.2. Pri la pozicio rilate akcenton de la vorto, maniere ke oni donas preferon al la vokalo, kiu okupas la akcentan pozicion, kaj se alipozicie, ĉu antaŭe, ĉu poste, al tiu vokalo, kiu lokiĝas pli proksime de la akcentita vokalo.

3.3. Praktikaj principoj por prononcado de vokalkombinoj.

Koncize, atentante la ĵus diritajn principojn kaj eble ankaŭ aliajn teoriajn nociojn, oni venas al jenaj (iom) praktikaj reguloj, laŭokaze elekteblaj;

3.3.1. Oni legus ĉiun vokalon aparte, alisone, do alisilabe. Tio estas la fakto mem, en multaj nacilingvoj, precipe por la grupoj *ao, ae, eo, ea, oe, oa*, kiuj en tiaj lingvoj estas fakte vokaloj de malsama silabo, do ne fonetike kombinitaj.

Oni foje uzas en Esperanto (Eo) tiun principon en iuj asimiliĝoj de monosilaboj, spite la fakton mem, ke en la nacilingvoj tia ortografia grupo eble

— Rilate la sonon, tio ne multe devas ĝeni la internacian leganton pro tio, ke en Eo la vokaloj estas simple unusonaj, do ne eblas konsideri ĉe ili iajn nuancojn en la komuna sistemo. Oni ilin legu kvazaŭ ili ne havas kromsignon.

— Rilate la akcenton, estas principe notinde, ke kiam la lasta vokalo de vorto estas kromsignita, ĝi laŭ la Eo-vidpunkto estas radikeca, do portanta akcenton.

4.2. Plej ĝeneraligitaj kromsignoj.

“**Akuta**” kaj “**malakuta**” supersignoj (‘, ’). Kvankam ne plene koincida kun iuj nacilingvaj (skribitaj) reguloj, tiu supersigno ĝenerale indikas “akute” la apertan sonon (foje tamen fermitan!), se eblas al la vokalo havi tian distingon, kaj sen konsidero al la ĝenerale mallonga elteno de prononcado.

Cirkumflekso (˘) ĝenerale prezentas fermitan, eble plilongigitan sonon de la vokaloj, se eblas tia longo- aŭ tono-distingo.

Tremao (˙). Kiam trovata sur vokalo sola, ĝi indikas ties sonhibridiĝon, ekz. *ä, ö, ü* (*ae, oe, y*). Saman efikon aliaj lingvoj akiras alirime. Kiam trovata sur unu vokalo de vokalduo, ĝi ĝenerale havas nur akcentan efikon, diereze indikante la distingan prononcon de ĉiu vokalo aparte.

Tildo (˜). Ĝi nazaligas la sonon de la vokalo (aŭ diftongo). Por pli malpli konvene reprodukti tian sonon en nazala formo, oni devas diri “n” post la tilde signita vokalo (aŭ diftongo). Nazaligon oni — en aliaj lingvoj — kromsignas alirime (v. pri aliaj subsignoj).

Aliaj super-, tra- kaj sub-signoj. Oni foje trovas alimaniere kromsignitajn vokalojn, ekz. *â, ă, ȧ* (la lasta signo nazaligas vokalojn en pola lingvo).

Iuj modifitaj literoj. Pormemore nur la jam cititaj: *ae, oe*.

5. Konsonantoj.

El ĉiuj konsonantoj, nur kvin (*c, g, s, j, h*) povas prezenti iujn malfacilaĵojn pri korekta prononco; precipe la samaj, kiuj en Esperanto ricevas supersignon, kvankam ne ĉiam pro la sama kaŭzo. Siavice, el ili nur *c* prezentas fakte seriozan, vere priatentendan komplikon. Rilate la aliajn kvar oni devas nur mencii iujn tamen negativajn nuancojn.

c

Tiu ĉi litero estas preskaŭ ĉiam prononcata “k” ĉiapozicie, escepte antaŭ *e, i* (*ce, ci*), kie ĝi sonas frikative, palate aŭ simile — laŭ koncerna lingvo — facile redonebla en Esperanto per sia “c”.

La malfacilaĵoj persistas, ĉar dum unuflanke la ĉi-supraj kutimoj ne estas tute, sed nur plejparte universalaj, kaj ĉar aliflanke povas okazi, ke oni malfacile rekonas, se la nomo jam estas “c”-asimilita.

Ŝajnas tamen, ke la problemo, estante nature tia, devas esti nur konstata en tiu lingva fako, spite tion, ke tio eble povas nin meti fronte al la risko, prononci “ts” la “k”-sonon de la nacia formo aŭ eĉ inverse, eldiri “k” la esperantan “c”.

g

La naciaj principoj por la senvoĉa *c* estas ĝenerale la samaj por la voĉa *g*, nur ke, se oni ne estas certa pri ties palata sono en la vorto, ĝi ne tiom gravas; oni povas ĉiam legi “g”. Tia sono, se ĝi eble ne estas tute korekta, ĝi almenaŭ estas tolerebla. Eĉ en transliteriĝoj, oni same ne ĉiam akceptas la “palatan” sonon, sed diverĝe eĉ preferas la bazan “g”-sonon.

j

En multaj lingvoj tiu litero sonas konsonantece (“j” aŭ simile). Sed ĝi same aperas duonvokalece en aliaj lingvoj. Elekti unu aŭ alian sonon ne ĉiam tiom gravas, nur ke en tiaj kondiĉoj estas pli facile prononcebla unu ol la alia, dum en aliaj kondiĉoj la inverso estus pli tolerebla. Do tio povas fariĝi la kaŭzo mem de la regulo.

s

La dueco de sonoj de tiu konsonanto estas tiom evidenta, ke eĉ ĉe asimiliĝoj oni ne malofte preferas transskribi per “z” la grafisman *s* por fonetika koincido kun la nacilingva formo, dum aliffoje oni preferas neglekti tion, transskribante laŭ la originala grafismo, ekz. Jesuo, jezuito; Izraelo, Israelo (= Izraelio).

Tion oni ĝenerale uzas por senco-nuancoj.

El tio evidentiĝas la negrava neceso elekti regulon pri tio, kvankam ĝi eble estus facile eltrovebla.

h

Spite la fakte tre varian funkcion de tiu ĉi litero en la diversaj naciaj uzoj, ĝi ne portas ian gravan malfacilaĵon.

Oni simple ĝin prononcas, kiam ĝi prezentiĝas antaŭ vokalo (komence de vorto aŭ de silabo). Sed post vokalo (samsilaba aŭ fine de vorto) ĝi prefere ne estu legata, ĉar en tia pozicio ĝi eble nur plilongigas la antaŭan vokalso non.

La foja malfacilaĵo povas okazi nur, kiam ĝi estas antaŭita de konsonanto, se oni ne povas bone scii, ĉu tiu konsonanto estas alisilaba finaĵo de vortelemento aŭ fakta kombinaĵo, do samsilaba.

6. Kombinoj de konsonantoj.

Ĝeneralaj principoj de prononcado

Por prononci tiajn “digramojn” oni havas laŭokaze unu el la tri jenaj metodoj:

— Oni klopodas, se tio estas ebla, prononci **ĉiun apartan literon**. En kunmetitaj vortoj de Esperanto oni agas tiel rilate samsituajn konsonantojn.

— Oni prononcas nur **unu el la konsonantoj** (tiun, kiun la nacilingva grafismo pretendas modifi). Tia estas la ĝenerala procedo, kiun Esperanto uzas en asimilado.

— Oni klopodas prononci rezultsone, pli malpli imitante la naciajn lingvojn laŭ la celoj mem de tiuj kombinoj. Tia procedo tamen ne malofte aperigas sonojn fremdajn al Esperanto.

La elekto de unu aŭ alia el tiuj procedoj, ĝenerale estas natura rezulto de la plej facile prononcebla provo, ĉar oni devas konscii, ke fonetike ĉio estas la plej eble facila en la naciaj lingvoj.

6.1. Duobliĝo de konsonantoj

La duobliĝo de konsonantoj estas rezulto de diversaj faktoj, inter kiuj la neceso: — redoni al la litero ĝian sonon, kiun ĝi eventuale perdis pro malavantaĝa pozicio en la vorto; — eble indiki alian duan sonon, precipe la koncerne “palatan”; — aŭ por produkti akcentan efikon sur la vokalo.

La baze taŭga maniero, prononci tiajn grupojn, estas ilin “distinge” eldiri, sed “unulitere”. Ne estas formetata la eblo, produkti la plej fortan aŭ plej longan sonon, se eble ĝi havas pli ol unu sonon, aŭ eĉ produkti ian halton ĉe la apuda vokalo.

En Esperanto tia procedo estas simile reprezentata de iuj ekzemploj, kie oni klopodas doni pli intensan sonon al la duobligita litero (*Anna*, Finnlando).

Dirende, ke laŭaspekte la duobliĝo okazas per ripeto de precize sama litero: *tt, dd, pp, bb, ff, kk, cc, gg, ss, zz, ll, mm, nn*, sed alifoje ankaŭ pere de samklasaj literoj: *dt, cq, sz, sc*.

6.2. Kombinoj kun h

Tiuj kombinoj plej ofte rezultigas aliajn sonojn; sed same ne malofte oni ilin uzas nur etimologiece, do sen fonetika esprimo. Oni memoru, ke tia grafisma procedo estis permesata en Esperanto ĉe telegrafio aŭ en presejoj sen taŭgaj rimedoj rilate la supersignitajn literojn.

Estas jenaj la plej kutimaj kombinoj:

<i>ph</i> senvoĉa frikativo	<i>f bh</i> do, produktus sonon “v”-similan
<i>th</i> senvoĉa dentalo frikativa	<i>θ</i> event. <i>dh</i> voĉa dentalo frikativa ð
<i>kh</i> pli forta sono de	<i>k gh</i> ne hezita sono de <i>g*</i>
<i>rh</i> forta sono de	<i>r</i> responde al <i>rr, r, r̄</i>
<i>lh</i> humida sono de	<i>l</i> responde al <i>ll, l̄, gl(i), lj</i>
<i>nh</i> humida sono de	<i>n</i> responde al <i>gn, n, n, nj</i>
<i>sh</i> humida sono de	ŝ

ch — Same kiel la simpla *c*, ĝi povas reprezenti sonon de la klaso de la velaroj, ĝenerale responda en Eo al “ĉ”. Jen strange, sed tamen fakto mem, eĉ interne de iuj nacilingvoj, do ne eviteble, ke ĝi same iom problemece transiĝu al la internacia.

Notoj: Oni konsideru la fakton, kiam konsonanto plus *h* estas ne kombinaĵo, sed alisilabe aparta litero.

Anstataŭ la kombinoj kun *h*, metata post la son-modifota konsonanto, iuj aliaj lingvoj uzas siasisteme la literon *g*, metatan antaŭe, ekz. *gn = n, n̄, nj; gl(i) = l̄, ll, lj*.

6.3. Kombinoj kaj efikoj de duonvokaloj sur la konsonantoj (influo de la palataj vokaloj)

Tiuj ĉi procedoj estas tre heterogenaj laŭ la necesoj, ebloj kaj emoj de la naciaj lingvoj. Tamen estas ĉiam principo, ke la palataloj (*e*, sed precipe *i*) — kiel la parenca duonvokalo *j* en Eo — influas la prononcon de la apuda konsonanto, ekz. *En-Fr: intuition*, Eo: kampanjo.

Foje la palatigo okazas eĉ sen grafisma reprezento de la palatiga vokalo, ekz. *tu* de *En: portuguese*.

La duonvokalo “u”, parenca al la konsonanto “v”, estas uzata en iuj nacilingvoj precize por eviti la rezultan efikon de la palatala alproksimiĝo rilate iujn konsonantojn, ekz. *que, qui; gue, gui*.

6.4. Iom pri la kombinoj de frikativoj, afrikatoj kaj plozivoj (ekz. *ts, pz, pf, pt, kt*)

* Inter la ĉefaj esceptoj citende la muta *gh* de *En*.

Kvankam tio ne meritas specialan atenton, la inverso tamen reliefigas pro la fakto, ke Eo, posedante la literojn “c, ĉ, ĝ”, foje preferas transskribi al la nacilingvoj kun respekto pri la universaligita ortografio, ekz. *Getsemane, Betsaida, Djakarta, Cambodja* kaj ne ĉiam Ĝakarto, Kamboĝo.

7. Kromsignitaj konsonantoj.

Tiu procedo — disdigi la sonojn de la konsonantoj en iuj naciaj grafismaj sistemoj — estis ja iamezure elektita de Esperanto.

La plej oftaj kromsignitaj literoj estas:

ç	transliterata de Esperanto per “c”
ʃ	samsona kiel la antaŭa ç
ś, ŝ-	respondas en Esperanto al “s”
ž, ž, ž	respondas en Esperanto al “j”
ř, ř	alia pli mola sono de “r”
ł	simplo humida (palata) sono de “l”, iam proksima al “u”
n, ñ, ñ	simplo palata sono de “n”, imite donita per “nj”

Kadro de la plej bazaj konsonant-sonoj en la nacilingvoj.

labialoj, t.e. “lipaj”	p	b	f	v					m
dentaloj, t.e. “dentaj”	t	d	θ	ð	s	z	l	r	n
humidaj					ŝ	ĵ	ł	ř	ñ
velaroj kaj glotalo	k	g	h	h					

Tiu ĉi kadro estas donita, por ke oni sciu, kiujn sonojn — kaj ne pliajn kaj ne aliajn — oni devas (aŭ povas) fonetike produkti fronte al prononcado de nomoj en nacilingva formo, ĉar la grafisma maniero prezenti ilin estas diverssistema laŭ la nacilingvoj.

Esperanto ne havas jenajn sonojn:

θ, ð	sonas kiel <i>En: th</i> , respektive en <i>thing</i> kaj <i>that</i>
ř, ř	plurvibra (guturala, palatala aŭ dentala), ne tro ofta
ł, ł	humida “l”, jotigite prezentata en Esperanto kiel “lj”, tamen ł en la rusa (Ru) kaj pola (Pl) proksimiĝanta al “u”
n, ñ, ñ	humida “n”, jotigite prezentata en Esperanto kiel “nj”

8. Fremdaj literoj de la internacia alfabeto.

Krom la 22 simplaj (ne supersignitaj) literoj de Esperanto, aliaj 4 literoj de la “internacia alfabeto” (*q, w, x, y*) kutime aperas en diversaj propraj nomoj laŭ iliaj nacilingvaj grafismoj. Ilia neplena uzeblo internacia kaj iliaj fonetikaj komplikoj kun tre diversaj anstataŭebloj estis, certe, la kaŭzoj, pro kiuj Esperanto ilin ne akceptis en sian alfabeton. Do ili rilatas la “internacian alfabeton” kvazaŭ “akcesoraj”.

Propraj nomoj ilin portas pro “propra” rajto mem laŭ ilia ortografia origino, eĉ konsentite pro fonetikaj aspektoj nefacile troveblaj en la komuna lingvo. Konvenas, ke oni scipovu ilin prononci pli malpli korekte.

w

Fonetike oni ĝin nomas “duobla v”, koincide kun la grafismo; ankaŭ “ŭov”, pli malpli akorde kun la koncerna fonetika funkcio. Ĝi estas vere konsonanto “v”, kiu regresive re-duonvokaliĝas al “u”. Esperanto kutime (sed ne ĉiam) ĝin transliteras per “v”.

Pro tio oni povas kontentige, universalece ĝin prononci laŭ ĝia baza sono “v”, ligita al la apuda vokalo pere de sia duonvokaleca duobliĝo “ŭ”. Eble tiu procedo estas la fonetika kaŭzo mem, sed se ne tiom tia ĝi almenaŭ teorie faciligas la transiĝon el la aŭ al la nacilingvaj kutimoj, laŭ kiuj oni elektas el tia duobliga kombino pli la konsonantecan aŭ pli la duonvokalecan sonon, ekz. “v(ŭ)”, “(ŭ)v” “ŭ(v)”, “(v)ŭ”.

y

La nomo de tiu litero estas “ipsilono”, “ŭaj” aŭ “i-greka”. Fonetike ĝi estas la simbolo de “hibrida” ŭ.

En la naciaj lingvoj (foje neperceptebla) ĝi sonas kvazaŭ iu nepursona el si mem plilongigita “ji” aŭ “ij”. Tia fakto, eĉ se eble nur teoria, ja eksplikas tehniko sin mem, ĉar kiam ĝi estas en vokala pozicio, ĝi cedas sian duonvokalecan sonon: “i(j)”, “(j)i”. Kiam ĝi okupas duonvokalan pozicion, ĝi cedas sian vokalecan sonon: “(i)j”, “j(i)”.

x

Oni ĝin nomas “ikso”. En la asimilitaj vortoj oni preskaŭ senescepte ĝin transliteras per “ks”, malofte per “s” aŭ alilitero. Fakte la nacilingvaj sonoj iras ekde “ks, kz, gz, k” ĝis “s, z, ŝ, ĵ”. Eĉ okazas, eble pro grafisma kapriko, ke ĝi estas muta (fine de vorto en Fr).

El ĉio tio ŝajnas neevitebla, ĝin regule prononci “ks”, sed eble kaj/aŭ laŭ-

vole oni same ĝin devus prononci “ŝ”, almenaŭ komence de vorto, se intertempe alia pli rekomendinda regulo ne aperos.

q

En Esperanto oni ĝin nomas “kuo”. En la transliteriĝoj ĝi donas lokon al la litero “k”, kvankam ŝajnas, ke ĝia baza aŭ kaŭziva sono, el la mediteraneaj lingvoj, kie ĝi iom pli ofte aperas, eble estus iu pli forta guturalo “kh(u)”, ekz. *Qumram, Qatar*.

Alia karaktero de tiu ĉi litero estas, ke ĝia uzo estas pli ofte en kombino kun tuj sekvanta duonvokalo “ŭ” (*quo, qua*) aŭ muta “u” (*que, qui*). Tia procedo per la senvoĉa *qu* transiĝas al la voĉa *gu* (same *guo, gua, gue, gui*).

Kvankam Esperanto kutimas ĝin transliteradi respektive per “kv, gv” (laŭokaze “k(v), g(v)”), oni tamen taŭge povas ĉiam prononci duonvokalece la enmetitan *u* de la nacilingvaj formoj.

9. Literaturo.

- Bokarev, E.A. (1966): Fonemo kaj sono en Esperanto. — *Nuntempa Bulgario*, 11, VI-VII. Sofio.
- Hyman, L.M. (1975): *Phonology theory and analysis*. — Holt, Rinehart, Winston. New York.
- Kawasaki, N. (1959): Esperanta elparolo kaj la japanoj. — *Esperantologio*, 2.1, 63-64. Copenhagen.
- Ladefoged, P. (1971): *Preliminaries to linguistic phonetics*. — University of Chicago Press.
- Ladefoged, P. (1975): *A course in phonetics*. — Harcourt Brace Jovanovich. New York.
- O'Connor, J.D. (1973): *Phonetics*. — Penguin Harmondsworth.
- Okamoto, J. (1925): *Fonetika studo de Esperanto*. — JEI. Tokio.
- Trubetzkoy, N.S. (1939a): *Grundzüge der Phonologie*. — Vandenhoeck, Ruprecht. Göttingen.
- Trubetzkoy, N.S. (1939b): *Wie soll das Lautsystem einer künstlichen internationalen Hilfssprache beschaffen sein?*. — *Travaux du Cercle Linguistique de Prague*, 8.5-21.
- Vasko, T. (1976): *Ĉu ideala sonsistemo?*. — *Esperantologiaj kalendaroj I. Universitat Eötvös Loránd. Budapest*.
- Wells, J.C. (1978): *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. — *Universala Esperanto-Asocio. Rotterdam*.

Modelo de fonetika internacia para os sistemas ortograficos nacionais.

Os nomes próprios de diversas nações, aparecem tão naturalmente em Esperanto, como se se tratasse de nomes em províncias diversas da mesma região. Daí a necessidade de os ler mais ou menos razoavelmente.

Eis o objectivo deste estudo:

Encontrar uma interpretação fonética global, em princípios básicos, apresentando as linhas gerais que conduzam à criação de regras práticas neste campo.

Primeiramente trata-se da questão das 5 vogais, que por si mesmas, já apresentam a concentração fundamental de todas as matizes das variedades pronúncias nacionais. Necessariamente se apresentam algumas excepções.

Depois faz-se a análise às 25 combinações gráficas possíveis, que estas vogais podem ter entre si. Estas combinações são classificadamente agrupadas e, segundo a consistência generativa de cada vogal e a sua posição na palavra, tiram-se as conclusões fonéticas de harmonia com o uso generalizado de todas as línguas.

O estudo a respeito das vogais termina por uma análise global aos sinais ortográficos, que se sob o ponto de vista de acento, que até para a possibilidade facultativa relativo a outros sons vogais além dos fundamentais.

A respeito das consoantes põe-se em relevo, que dessas, só 5 podem apresentar diferenças fonéticas maiores, contudo não demasiado graves a nível internacional, e é possível resolver cada caso à parte sem grandes dificuldades. É contudo digno de nota a excepção relativo ao som internacional da consoante “c”, que continua sem solução.

Em seguida apresenta-se um estudo pontual a respeito do modo de se ler os dígrafos consoânticos, começando pelas consoantes dobradas e passando às combinações com “h”, processo tão rico na produção de novos sons, dos quais alguns existem em Esperanto, enquanto que outros são específicos só de algumas línguas nacionais. São também mencionadas algumas excepções facilmente reconhecíveis.

O estudo das consoantes termina, indicando o modo de poder ler aquelas que, em certas línguas, são modificadas por sinais ortográficos.

Finalmente, apresentam-se as quatro letras (q, w, x, y) que não fazem parte do alfabeto em Esperanto, e para todas elas se indica como convém lê-las, de maneira que se possa mais ou menos distingui-las de outras em Esperanto, e principalmente obedecer a bom contento a uma convergência universal da sua multiplicidade divergente de sons, por vezes até dentro da mesma língua nacional.

De la sama aŭtoro, en SCIENCA REVUO aperis:

1976: La karaktero de la geografiaj propraj nomoj — specife pri la “gento/lando” — sencaj nomoj. SR, 151-158. *Beograd*.

1976: La valoro de la geografiaj sufiksoj. SR, 157-166. *Beograd*.

J. Kavka